

## Jos vertelt (Jos rakontas) - kromaj faktoj por grupgvidantoj:

### 1 / frakseno

- laŭ la antikvaj grekoj, ties cindro estis bona por tiuj, kiujn mordis vipuro
- la semoj bongustas al birdoj kaj cimoj
- la cindro ofertas protekton kontraŭ malbonaj spiritoj kaj danĝeraj bestoj: dum laboro la kultivistoj metas siajn bebojn sub cindron de frakseno
- ĝi estas 'veterproгноza' arbo

### 2 / betulo

- en la skandinavaj landoj la betulo estas honorata kiel arbo de lumo kaj printempo
- en Germanio ĝi estas uzata kiel majpolo
- la sanktaj vedaj tekstoj en Barato estas skribitaj sur betulŝelo
- betula ligno estas la perfekta ligno por tamburoj kaj sonkesto
- ĝiaj branĉkreskaĵoj (ekestintaj pro parazito, fungo ktp.) estas dankeme uzita de sorĉistinoj ('sorĉistinaj balailoj') por flugi tra la aero ;-)

### 3 / Kristodorna glediĉio

- la guŝoj de la glediĉio povas esti uzataj kiel tinkturfarbo por teksaĵoj
- en Afriko la freŝaj fruktoj estas uzataj kontraŭ pulmaj malsanoj

### 4 / alno

- en la foto en la mezo vi povas klare vidi kiel la ŝelo ŝanĝiĝas kiam ĝi subakviĝas
- per simbiozo kun bakterioj ligas ĝi la nitrogenon el la aero: tiel ĝi iĝas bona verda sterko
- la folio estas ankoraŭ verda sur la tero aŭtune> neniu aŭtuna koloriĝo
- foliojn foje manĝas la alna skarabo
- ĝi povas esti tranĉita same kiel la saliko por produkti flekseblajn branĉojn
- alno-ligno estas tre bona por fumumado de manĝaĵoj
- ĝia tanino estas uzata en la prilaborado de ledoj kaj la kolorigo de vestaĵoj kaj ĉapeloj (en ruĝa, flava aŭ nigra)
- la interna ŝelo estas uzata por dentopasto kaj gumprotekto
- alno-ligno estas tre bona brulligno, kiu produktas multe da varmo en mallonga tempo> bona por la varma bakista forno
- kiel morta ligno, ĝi estas paradizo por fungoj
- la alno-ligno havas grandan akustikan kvaliton kaj estas uzata de instrumentfabrikistoj

### 5 / pirarbo

- la pirarbo estas sentema al nokta frosta damaĝo, sed ekzistas ankaŭ variaĵoj, kiel *Konferenc-piro*, kiuj ne ĉiam bezonas fekundigon por doni fruktojn
- la piroj unue staras vertikalaj kaj nur post iom da tempo komencas pendi
- pirarba ligno estas tre bona brulligno
- oni fumis pirarban folion antaŭ la alveno de tabako (15-a jarcento).

### 6 / karpeno

- la ligno estas sentema al lignovermo
- la ligno estas uzata por papero, sed ankaŭ por ludiloj, ŝuformoj, buĉistaj blokoj ...
- la folioj estas bona nutraĵo por bestoj

## 7 / robinia falsa akacio

- la robinio povas elteni poluadon
- robinia teo helpas kontraŭ konstipo
- la plej maljuna arbo en Parizo estas robinio plantita en 1601; ŝoso eliranta el unu el ĝiaj radikoj nun fariĝis la plej maljuna arbo en Nederlando
- la robinio povas krei nepenetreblajn heĝojn
- la radikoj havas tuberojn kun bakterioj, kiuj enkondukas nitrogenon en la grundon.
- La robinio ŝatas la sunon

## 8 / acero

- dum la dua mondmilito usonanoj fabrikis transportveturilon, bazitan sur la acero samara; ĝi povis sekure subigi pli- malpli 29 kg da ŝarĝo al la tero
- la acero povas iĝi 40 metrojn alta kaj 500-jara
- ĝi kreskas rapide, sed ne floras antaŭ ol atingis 20/25 jarojn
- la acero ŝatas lumon kaj estas forta konkuranto por aliaj arboj
- la fruktoj povas mortigi ĉevalojn (EAM = Ĉevala maltipa miopatio)
- ĝi estas vaste uzata por produkti paperon

## 9 / kratago

- la floroj de la kratago havas fortan odoron
- la krataga flor-teo havas trankviligan efikon
- kratago-folia teo, aliflanke, akcelas la korbatojn kaj bonas por la sanga cirkulado
- superstiĉo: la kratago ofertas protekton kontraŭ vampiroj kaj sorĉistinoj

## 10 / marĉa kverko

- Quercus Palustris devenas el Ameriko kaj estis enkondukita en Eŭropon en 1770
- la folioj profunde ruĝiĝas aŭtune
- la viraj kaj inaj floroj kreskas sur la sama arbo
- iuj indianaj triboj uzis la ŝelon kurace kontraŭ stomaka doloro
- Bonifaco estis mortbatita de frisoj en Dokkum ĉar li bruligis ilian sanktan kverkon
- La plej bonaj vinbareloj estas faritaj el kverko
- la krono de la romaj imperiestroj estis plektita el kverkaj folioj

## 11 / ilekso

- la ilekso estas la sola ĉiamverda foliarbo de Eŭropo
- ĝi ofte troviĝas en fagaj kaj kverkaj arbaroj (toleras ombron kaj acidan grundon)
- la teo el junaj folioj reduktas la febron kaj helpas eligi la urinon
- la ilekso estas simbolo de senmorteco
- en kristanismo la ilekso rilatas al la infano Jesuo (Jozefo kaj Maria kaŝis sin en ileksarbaro de la soldatoj de Herodo)
- ĝi kreskas malrapide, povas vivi ĝis 300 jaroj kaj atingi altecon de 20 metroj
- la ŝelo estis uzata por fari gluon por kapti birdojn

## 12 / Japana ĉerizarbo

- fortika, eltenas tre malaltajn temperaturojn
- anoncis la sezonon de plantado de rizo> tial estas bone trinki sakeon
- aŭtune estas festo ankaŭ en Japanio, por la bela ruĝa aŭtuna folio de la japana ĉerizo, kompreneble, sed ankaŭ de la japana acero, de la ginkgo, kaj de multaj aliaj arbospecioj.